

JAZYK VŠESLOVANSKÝ A ESPERANTO.

Napsal Jos. Krumpohlc. — (Pokračování.)

Že to nebude tak brzy, viděli i z toho, že sám prof. Lamanský, hlavní představitel hnutí za ruštinu, jenž nevidí pro jižní Slovanů v Rakousku jiné možnosti osvoboditi se z duševní podřízenosti italské, německé a maďarské vzdělanosti, literatur a jazyků než přijetím ruštiny za orgán věd a vyšší vzdělanosti, za jazyk diplomatický, ježto jedině ruština prý může býti společným orgánem Slovanů rakouských a ona jediná může vytlačiti u nich němčinu z nynějšího užívání, . . . přece jen si velkých nadějí nečiní, řka, že »je-li ruskému jazyku skutečně souzeno býti všeslovanským diplomatickým jazykem, tož jeho rozšíření u Slovanů vzejde hlavně skrze Uherskou Rus (!) a Slováký« (!!). — Máme tedy po radosti; neboť jestliže sám Kuzmány, jenž byl jednou z příčin odpadnutí Slováků od češtiny (v úmyslu mezi jiným přiblížiti se tím k ruskému, jak za to měl, všeslovanskému jazyku), už koncem r. 1853 odváděl Radlinského od slovenčiny, žádaje, aby osvědčil se písemně, že bude zase užívat češtiny »kteráž jediná nás z podezření panslavismu a russismu vymáhá«,*) což teprve žádati lze od Slováků jiných, zvláště když i sám L. Štúr, nejhorlivější z nich rusofil, doznává na konci článku svého »Slovanstvo a svět budoucnosti«, že »podle lidské samolibosti nelze očekávati, že naše plemena odhodlají se k tomuto sjednocujícímu kroku, čehož při nynějším cizím panství nelze ani provésti«.

Jak patrně, Štúr podobně jako Šafařík a Danilevskij očekává, že veliké dílo sjednocení Slovanů rozřeší se jen pod nátlakem vážných politických událostí. — »Která slovanská řeč a která slovanská abeceda bude všeslovanská už nerozhodne více péro, už rozhodne jen meč...« píše Šafařík r. 1826 Kollárovi, a Danilevskij r. 1871 dokazuje, že literární sjednocení Slovanů nemůže se státi dříve nežli politické . . .

*) »Slovenské Pohľady« 1897 str. 630, 1904 str. 672.

Tak-li tomu, jak soudí tito jistě povolání mužové, kdy — kdy dočkáme se svého sjednocení? A to ještě nevzali jsme v úvahu odpor Poláků proti Rusům, jehož nelze přece přehlížeti, aniž jsme se slovem dotkli slabých stránek ruštiny, s nimiž přece také nutno počítati.

Vytýkajíť sami stoupenci ruštiny, na př. Podgornik, že nedostává se jí hlavního nářečí, které bylo by symbolem a orgánem spojujících sil jazyka, že nedostihla zcela také úplně zákonoměrnosti ústrojí a složení, což jeví se v množství mluvnických výjimek a nepravidelností, lexikálních pleonasmů, nedostatečně označených synonym atd., následkem čehož učení se ruštině jest velmi těžké a to zase zdržuje její rozšíření doma i v cizině.

A jestliže bilance naše s ruštinou dopadla tak smutně, ba beznadějně, co teprve očekávati lze u jiného jazyka, na př. u srbštiny, doporučené za všeslovanský jazyk Hattalou a nedávno drem H. Jirečkem?

I když opravdu srbština, jak tvrdí dr. Jireček, »nejspíše by se hodila z živoucích slovanských řečí za mluvu všem Slovanům společnou«, ježto po jeho zdání »má všechny vlastnosti, aby se stala obcovací řečí všem Slovanům společnou«, nebudiž zapomínáno, že bylo-li by volit ruštinu již proto bezúspěšným, jak dí dr. Jireček, že by ji nepřijali ani Polané ani Čechové, ježto »slovanským kmenům, kteří mají mluvu vyvinutou a pohlížejí na svou bohatou literaturu, vždy bylo by za těžko, aby se jeden podrobil druhému, a byť by to bylo i jen pro docílení společné mluvy«, nebudiž zapomínáno, že totéž a měrou ještě větší platí i o srbštině, o níž sám p. dr. praví, že »nemá velké literatury«.

(Dokončení.)



INTERNACIAJ PAGOJ.

Speciale por »Český Esperantista« boheme verkis *JUDr. Jos. Bürger.*

(Fino.)

La profitoj rezultantaj el la kompesado de internaciaj pagoj per devisoj estas tiel evidentaj, ke per la sendado de oro oni kompensas sole la diferencon de devisoj pagotaj en iu momento. Tiel ekzemple grandega milita kompensaĵo de Francujo 4.990 milionoj da frankoj estis transportita en Germanujon en devisoj valorantaj 4.248 milionoj da frankoj

kaj sole la restaĵo 742 milionoj da frankoj estis transportita en pagiloj, respektive en oro.

Estas nature, ke oni ne lasas al hazardo, kiom da devisoĵ devenas en ambaŭ partioj, ke la homa celhava agado celanta aŭ propran utilon aŭ komunan bonon reguligas la cirkuladon de devisoĵ tiel, ke estu kiel eble malplej necese sendadi metalon. Tiel ekzemple la bankoj eldonas eĉ negarantiatajn kambiojn kontraŭ siaj fremdlandaj korespondantoj, kiam estas enlande postulo de devisoĵ; kambia borsanaro aĉetas devisoĵn por fremda ŝtato en regno, kie ili estas malmulteprezaj, kaj vendas ilin tie, kie ili estas pli multeprezaj (la sekvo de tio estas, ke la kambiaj kursoj al fremdaj ŝtatoj samtempe kaj proporcie iras supren aŭ malsupren) kaj la notbankoj aĉetas kaj al enlanduloj transdonas la fremdajn devisoĵn eĉ kun malprofito, kiam la postulo de ili estas tiel granda, ke la valoro de enlanda valuto malpligrandiĝus. Tie ĉi oni povas ankoraŭ aludi »la pagadon trans fremdaj lokoj.« Nome la kambiaj kursoj de tri aŭ pli multe da ŝtatoj povas hazarde veni en tian staton, ke la ŝuldanto pagonta el regno A en regnon B faros pli bone, se li aĉetos devisaon por C kaj per ĝi en regno C devisaon por B, ol se li aĉetus la devisaon por B.

La plej novaj tendencoj en internacia pagado celas al tio, ke oni ne bezonu eĉ la restaĵojn, kiujn oni ne povas kompensi per devisoĵ, kompensi per oro. Perilo por tio devas esti institucioj similaj al tiuj, kiuj en la regno interne senbezoniĝas la cirkuladon de mono, nome banknoto, ĝirokonto kaj klearingo. Principe oni celas tion, ke per konstantaj institucioj estu por ŝuldoj de unu lando pagotaj en nuna momento, sed ne pageblaj per devisoĵ, ebligata la prokrasto al la pli malfrua momento, kiam eble la kreditaĵoj de la sama lando superos tiel, ke ili sufiĉos por kompensi ĉiujn ŝuldojn pagotajn en tiu malpli frua momento kaj krom tio ĉiujn ŝuldojn prokrastitajn de la antaŭa tempo.

Se oni ne rigardas la mosenadon per poŝtmandatoj, kiu maniero estas malpli grava, oni povas konstati la paŝon al realigo de tiuj novaj celadoj en sekvantaj aranĝoj:

1. Per helpo de poŝta ŝparkaso de reĝolandoj kaj provincoj reprezentataj en la regna (imperia) parlamento (= Aŭstrio) la konthavantoj povas efektivigi la pagojn en Germanujo, Francujo, Anglujo, Svisio kaj Italujo kaj reciproke en tiuj regnoj oni povas sen mosenado pagi por la kont de klientoj de la ŝparkaso, en bankoj, kun kiuj la poŝta ŝparkaso interrilatas. La pagoj faritaj estas kalkulataj laŭ la kurso, kiun

la komercaĵo de fremdaj banknotoj havis en borso Wien'a, respektive fremda la tagon antaŭan. Ekzemple: Mi devas pagi 100 M en Germanujon. Germanaj banknotoj ekzemple estis signitaj hieraŭ en Wien komercaĵo 117'235; laŭ tio la poŝta ŝparkaso krom malgranda provizio alskribos al mia debeto por tiu ĉi pago 117'235 K kaj ĝi prizorgos la pagon pere de »Deutsche Bank« en Berlin.

2. Hamburg-Amerika-Linie kune kun Diskontgessellschaft eldonas »Travellers-Checks« notantajn la sumon en diversaj monistemoj en la sama rilato (M 100 — K 116'17 — £ 4/17/1 = Fr 122'10 = Ro 45'80). Tiujn ĉekojn enkasigas ĉiuj bankoj en la mondo, kiuj havas interrilaton kun Discontgesellschaft (ekzistas kelkaj miloj da ili) sen rabato en sia valuto.

3. »Ĉekbanko esperantista« en London.*

El la proponoj, kiuj pro sia teoria motivhavo certe fariĝos aferoj diskutataj kaj poste praktike efektivigataj, la propono de Bendixen (direktoro de hipotekbanko en Hamburg) apogante sin je samaj bazoj kiel genia monteorio de Knapp, celas tion, ke la bilbankoj ĝenerale ŝanĝu oran trezoron por deviso kaj tiel en la lando estus ĉiam sufiĉe da deviso por kompensi ĉiujn ŝuldojn. Fine Julius Wolf (Breslau) parte en mezeŭropaj ekonomiaj societoj faras preparojn por problemo pri plifaciligo de internaciaj pagoj, parte bazante sur la publicistaj iniciatoj de iama itala ministro Lugotti, okaze de nordamerika financa krizo en la lasta jaro, proponas en »Zeitschrift für Sozialwissenschaft« (XI, 44) alternative sekvan-tajn manierojn por solvi la problemon:

1. la notbanko de unu ŝtato stampmarkas banknotojn de fremda banko estante preta interŝanĝadi ilin kontraŭ siaj banknotoj; tiam oni povas fari la pagojn inter ambaŭ ŝtatoj per tiu stampmarkitaj banknotoj;

2. ĉiu notbanko krom sia trezoro kiel fundamenton por eldonado de internaciaj banknotoj kapablaj por internacia cirkulado havos en London metalan trezoron estantan dum milita tempo sub la internacia protekto;

3. se iu mendas en notbanko oron por eksporto fremd-landen, la banko avizos notbankon de tiu ĉi lando, ke ĝi pagu al la mendinto la sumon en siaj banknotoj kaj por tio ĝi sendos al ĝi $\frac{1}{3}$ da sumo en oro kaj $\frac{2}{3}$ ĝi skribos por ĝia bono;

*) Pri kiu ni raportis en tiu ĉi revuo sur pĝ. 32.

4. aŭ en la sama okazo la banko asignanta donos al la paganta la valuton en siaj banknotoj;

5. aŭ fine ĝi skribos al ĝia bono la tutan valuton en internacia ĝirokonto, kiun bankoj malfermos al si reciproke.

Ĉiuj proponataj manieroj supozas sole la solidecon de ambaŭ partoprenantaj bankoj kaj ŝtatoj, kaj oni ne povas kompreni, kial la kredito, kiu en tiom da aliaj okazoj kiel enlande tiel inter nacioj limigas la pagadon per mono, ne povus ankaŭ tie ĉi plenumi sian taskon.

En Praha 21./12. 1908.

La boheman originalon el manuskripto esperantigis *Karel Biskup*.



IDEO DE J. A. COMENIUS PRI LA LINGVO UNIVERSALA.

Originale verkis *Jos. Krumpholtz*.

(6. daŭrigo.)

Pri la ebleco de artefarota lingvo universala Comenius estis absolute konvinkita kaj certa. Li havis por tio argumentojn raciajn kaj ankaŭ religiajn. Li kredis, ke, se iu komprenos la ideon de lingvo kun ĉiuj ĝiaj necesajoj, li povas ankaŭ konstrui lingvon novan. (Panaŭgio XIV, 19.)

»Ni mem« — skribas *Comenius en Via lucis (XIX, 21)* — »apogante nin sur fundamentoj pansofiaj, povus esperi lingvon, kiu estus dekfoje pli facila, centfoje pli perfekta kaj milfoje pli ĝusta por harmonia esprimado de karakteroj kaj substancoj de aferoj ol la lingvo latina«.

Kial do *Comenius* ne konstruis tian lingvon? — Li lasadis tiun ĉi laboron por korporacio de instruituloj kaj por la tempo, ĝis kiam la pansofio estos finita.

Kiel forte li esperis la eblecon de artefarota lingvo oni vidas sufiĉe el ĉi tiuj liaj vortoj: »Oni eble ne dubas pri ebleco konstrui lingvon novan. Se tamen iu dubas pri tio, mi diras, ke tio estas ebla, nome per la rajto de Dio al la homo transdonita. Ja, kiel la vidado de aferoj, tiel certe ankaŭ la nomado de aferoj estas parto de regado super la kreaĵoj, kiu estos pruntita al la homo. Kaj, se estis ĝis nun permesite al Adamo, al filozofoj, metiistoj k. t. p. donadi nomojn al aferoj, kial ne estus permesite al ili donadi ankaŭ verbojn kaj la alian, kio apartenas al la lingvo? Kaj se devenis sen-

intence tiom da lingvoj sole per konfuzo, kial do ne ankaŭ unu per konsiliĝo, prudento kaj refoja plibonigo? Aŭ, kial ni ĉion ĉi al hazardo lasus kaj prudenton preterlasus? Kaj se oni permesas plibonigi ideojn pri aferoj, kial ne ankaŭ akomodadi lingvon por pli preciza esprimado de ideoj plibonigitaj?« (*Via lucis* XIX, 18) — »Vere certe, kiel Dio ne malpermesas al penado de homoj, sed pli eble ordonas, ke ili kreu pri aferoj *ideojn ĝustajn*, tiel li eĉ ne povas malpermesi, ke homa penado ne kreu *nomojn ĝustajn* pri aferoj. Se nur estas la tempo, kiam (kiel antaŭdiris la profetoj) oni devas kunvenigi ĉiujn naciojn kaj lingvojn, por ke ili venu kaj vidu la gloron de Dio« k. t. p.*)

Kio do malpermesas havi fidon, ke iam kunkreskos en tuton tiuj partoj, kiuj kreskis iom post iom, kaj ke tiuj aferoj, kiuj evoluciis paŝon post paŝo, tamen iam fine aperos en formo perfektega kaj kiuj antaŭe apartenis al tiu aŭ alia homo, nacio, lingvo, sekto, ke ili fariĝas komunaj por generacio homara? Certe, kio havas ŝtupojn, necese havas ankaŭ la plej altan ŝtupon . . .

Kaj se oni povas ion tian esperi, kial ne ankaŭ deziri tion kaj penadi pri tio, precipe, kiam devigas tion ankaŭ la bezonoj de homara generacio. (*Pans. diatyp.*)

Tiel opiniis kaj skribis pri l' ebleco de artefarota lingvo universala *Comenius* jam 230 jarojn antaŭ la glora lingvisto *Max Müller*, kiu ankaŭ certigas, ke artefarita lingvo estas ebla, kaj ke ĝi povas esti multe pli simpla, pli perfekta, pli regula kaj facila ol kiu ajn lingvo nacia. (Daŭriĝo.)



LA BELULINO KAJ LA BESTO.

Malnova franca fabelo de s-ino *Leprince de Beaumont*.

(Daŭriĝo.)

Fininte la vespermanĝon ili aŭdis grandan bruon, kaj la komercisto kun larmoj adiaŭis sian kompatindan filinon, ĉar li komprenis, ke la Besto venas. La Belulino ne povis ne ekstremiti, vidante tiun malbelegan vizagon; sed ŝi kuraĝiĝis kiel eble kaj kiam la monstro ŝin demandis, ĉu ŝi venis memvole, ŝi tremante jesis. »Vi estas tre afabla — diris la Besto — kaj mi tre dankas al vi. Bonulo, vi foriros morgaŭ

*) Vidu paĝon 58-an de tiu ĉi gazeto.

JAZYK VŠESLOVANSKÝ A ESPERANTO.

Napsal Jos. Krumpholtz. — (Dokončení.)

A když by přece »srbštině již proto s chutí a radostí učil se každý vzdělaný Slovan, že by nezakoušel obtíží ve vyslovování, jak se to děje u češtiny, polštiny i ruštiny« — oč ochotněji a radostněji, podle této theorie, učilo by se Slovanům všelidskému a tedy i všeslovanskému jazyku — esperantu, o němž sám L. N. Tolstoj tak příznivě se vyslovil a jímž by otázka společné obcovací řeči Slovanů nejen rázem, ale i mnohem lépe byla rozhodnuta! Neboť vše zajisté, co lze krásného říci o srbštině, platí plnou a namnoze i větší ještě měrou o esperantu: Nemáť esperanto zrovna tak jako srbština přílišných měkkostí ani břeských zvuků a při tom jest boható v kořenech a dalšího rozvoje dokonale schopno. Odchylek dialektických rovněž nezná a, jsouc jazykem knižním, jest i naprosto jednotným.

Je-li pravopis srbský »jednoduchý a až na některé novodobé zbytečnosti lehký a pravidelný«, je pravopis esperantský naprosto pravidelný a jednoduchý a opravdu nejsnadnější na světě, poněvadž je i čistě fonetický. Píše se jak se mluví, a mluví se, jak se píše.

Literatura esperantská, podobně jako srbská, není sice dnes ještě veliká, ale za to opravdu světová a klassická, obsahující díla Byronova, Ezopova, La Fontaineova, Göttheova, Gogolova, Homerova, Leibnizova, Moliérova, Puškinova, Shakespearova, Schillerova, Vergilova atd. vedle více než 70 časopisů obsahu i vědeckého. Jeť esperanto, podobně jako srbština, řeč pružná i ohebná, takže dobře hodí se k vytvořování názvosloví kterékoli vědy, jak o tom svědčí překladatel Leibnizovy Monadologie do esperanta E. Boirac, rektor university dijonské, řka, že esperanto hodí se k vyjadřování pomyslů i nejjemnějších, přesných i abstraktních jak v literatuře, tak i ve vědě a filosofii.

A nelze-li esperanto jako srbštinu psáti i azbukou jako latinkou, není to chybou, nýbrž právě předností; tím

alespoň nepozorovaně a tedy pokojně odstraní se zásluhou jeho různost písem, jež podobně jako rozmanitost jazyků překážkou jest šíření vzdělanosti a pokoje mezi národy.

Nuže tedy, co chtít ještě více? — Že esperanto vyniká i krásou, libozvučností a snadností, o tom dostatečně, tuším, svědčí vynikající umělec německý Em. Reicher, jenž o tom napsal v »Theater-Courieru«: »Osobně zajímám se o esperanto s čistě uměleckého stanoviska — k vůli jeho zvučnosti — a nepochybuji ani v nejmenším, že tato snadná a libozvučná řeč nalezne v brzku všeobecného rozšíření.«

Úchvatná to zajisté perspektiva: Společný, jednotný jazyk obcovací (dorozumívací) nejen pro 150 millionů Slovanů, ale pro celou Evropu, a nejen pro Evropu, ale pro všech pět světa dilů jazyk zvučný, bohatý, vývoje schopný a snadný, neohrožující svéráznosti ani samostatnosti národů a jich jazyků, nepodmaňující ani neodnárodňující, ale sloužící všem a vracející národům nesmluvitelným zase rty jedny i činící zemi všechnu rovinou . . .

Končím. — Dobro čím obecnější, tím lepší, praví náš Komenský. Lepší slunce svítící všem, než svíce, svítící jednomu nebo několika . . .



LIBERA PENSO KAJ ESPERANTO.

Kia estas rilato inter Libera penso kaj esperanto?

Libera Penso, internacia ligo, batalanta por liberigi la homaron de antaŭjuĝoj, forjetanta ĉian perfortadon, institucio garantianta al ĉiu individuo la liberecon de konscienco, en kia rilato ĝi estas al esperanto?

Esperanto, la plej facila lingvo internacia, kiu fariĝis por la homaro elirejo el Babelo de lingvoj malfacile lerneblaj, kiu sukcesis enradikiĝi kaj gajni oficialan aprobon, kiu komencas esti enkondukata en lernejojn, per kiu korespondas inter si anoj de la plej diversaj nacioj, kiel rilatas al Libera penso?

Certe ambaŭ movadoj estas internaciaj, kaj kiel tiaj ili devas fiksi la vidpunkton de unu al la alia. Ĉiu homo, kiu interesas sin pri la problemoj internaciaj ĉiupaŝe renkontas unu aŭ la alian. Ni ĉiuj, kiuj alkiutimiĝis tiun manieron de pensado, sentas, ke tio estas la sama flanko de nia estaĵo, kiu

ekamis tiujn ambaŭ tendencojn, kaj ŝajnas al ni tute nature, ke ili kuniĝis en unu societo (en esperantista asocio de liberpensuloj »*Libera Penso*« fondita de franca profesoro Renné Deshayes).

Kaj kiuj estas la elementoj, kiuj tiel proksimigas tiujn ĉi tendencojn? Tio estas la granda penso, kiun proklamis ĉiuj grandaj pensuloj de ĉiuj epokoj, de Budha ĝis Tolstoj, kiu estas enkorpiginta en grandaj sistemoj religiaj kaj filozofiaj, kaj kiu estas al ni tute proksima en modernaj natursciencoj, nome, ke ekzistas neniu kaŭzo por tio, ke ni loĝantoj de unu sama planedo reciproke malamu nin kaj faru al ni malbonon.

Libera penso postulas la liberecon por ĉiu, al kiu ajn nacieco li apartenas, ĝi postulas liberecon de konscienco kaj batalas kontraŭ ĉiu subpremanto. Tial egale povas ĝin akcepti laboristo batalanta por siaj homaj rajtoj kontraŭ la kapitalo lin ekspluatanta, kiel sciencisto, al kiu en libera serĉado malhelpas reganta aŭtoritateco, kaj egale serĉas en ĝi apogon malforta perfortata nacio kontraŭ ŝoveno lin subpremanta. Libera penso kunigas ĉiujn subprematojn kaj invitas ilin al unueca batalo kontraŭ la subprematoj. Ĝi kunigas anojn de la plej diversaj nacioj kaj jam pro tio ĝi devas bonvenigi internacian lingvon interkomprenigan kiel la plej taŭgan rimedon por atingi de sia celo.

Kaj aliparte esperanto ebligante la interrilaton de la plej diversaj nacioj, renkontas ofte malhelpaĵojn, kiuj havas sian ĉefan argumenton en antaŭjuĝemo de la nacioj kontraŭ si, en malnovaj malpacoj, kies kaŭzo estas homaj regemo kaj avideco pri regado. Kaj por venki tiajn malhelpaĵojn, kiu alia helpo al esperanto ol Libera penso batalanta kontraŭ ĉiu subpremanto?

Vere estas certe, ke esperanton povas uzi ankaŭ subpremantoj kontraŭ subprematoj, sed same estas certe, ke tiu ĉi rimedo ne helpo al ili por ĉiam, ĉar la homoj, kiuj subpremas havas malmulte da sento por solidareco, pensante senĉese sole pri sia utilo, kaj estante pretaj forlasi sian kunulon tuj, kiam oni postulas de ili oferojn.

Kompreneble ankaŭ tiuj, kiuj ne scias kaj ne uzas esperanton, povas esti liberpensuloj, sed ili ne povas esti malamikoj de ĝi, se ili ne volas ekstari sian propran principon. Kaj kontraŭe neuzante esperanton ili senigas sin de la plej bona rimedo propaganda por disvastigi siajn ideojn.

Nek esperanto nek Libera penso estas celo por si mem. La celo de ambaŭ estas malpli proksime, ilia celo estas pli alta. La celo estas la konstruo de la unueca homo pli alta, de la homo konsciaanta siajn devojn kaj memoranta sian taskon de la plej supera reprezentanto de vivanta materio sur tiu ĉi planedo.

Libera penso postulas, ke la homo estu libera, esperanto ebligas, ke li komprenu sin mem. Tial estas dezirinde, ke ĉiuj liberpensuloj kaj esperantistoj aliĝu al internacia esperantista asocio »*Libera Penso*«.*)

Dr. Alex. Batěk.



IDEO DE J. A. COMENIUS PRI LA LINGVO UNIVERSALA.

Originale verkis Jos. Krumpohlc.

(7. daŭrigo.)

Laŭ la opinio de *Comenius* estas du metodoj, kiel oni povas konstrui la novan lingvon universalan: induko de aferoj kaj induko de lingvoj konataj.

Pri la unua metodo *Comenius* skribis sole ĝenerale kaj ne multe; tial oni ne povas klare prezenti al si, kiel oni la artefarotan lingvon universalan devus krei »per la induko de aferoj mem.«

La dua metodo estus ia imito de *Zeŭxis* (la greka pentristo en la dua duono de la V-a kaj la unua duono de la IV-a jarcento antaŭ Kristo), kiu, intencante pentri *Helenon*, ordonis alkonduki la virgulinon de la plej bela kresko, kiom da ili oni povis en Grekujo trovi, kaj ĉion ĉe ili ĉiuj zorge esploriginte, kiun membron ĉe iu li vidis superi, tiun li transportis sur sian *Helenon* kaj tiamaniere li feliĉe esprimis ian modelon, ian ideon de la plej supera beleco. — Io simila povus fariĝi ankaŭ tie ĉi (en lingvo), se ĉio, kion ajn iu lingvo havas precipe »kvintesencan«, ornaman kaj superantan (kaj sendube neniu estas tiel malfeliĉa, ke ĝi ne havu ian specialan superaĵon), tio ĉio de ĉie estus kolektita kaj en tiun unu lingvon harmonie kunmetita, por ke el multaj belaĵoj fariĝu unu, sed kvintesenco de belaĵoj.« (»*Via lucis*« XIX, 20.).

*) Aliĝojn de bohemiaj esperantistoj-liberpensuloj akceptas bohema komitatano de L. P. s-o Dr. Alex. Batěk en Plzeň-Locholín, aŭtoro de tiu ĉi artikolo.

Rim. de l' red.

Tiujn ĉi pensojn skribis *Comenius* dum sia loĝado en *London* (1641—42), pensante eble je la lingvo *angla*, pri kiu li sciis, ke ĝi devenis el la lingvoj saksa, malnova brita kaj franca, kiel la lingvo *itala* el lingvoj de Vandaloj kaj Gotoj. (*«Metodus linguarum»* III, 15.)

Por ke la nova lingvo universala estu kiel eble plej reala, objekta, *Comenius* deziris, ke ĝi ne estu konstruata pli frue ol ĝis kiam la pansofio estos finita, t. e., ĝis kiam almenaŭ la seksoj, ideoj kaj specialaĵoj de objektoj estos ĝuste komprenitaj.

Plue deziris *Comenius*, ke neniu elpensadu mem la novan lingvon universalan, sed ke oni lasu la zorgon pri la nova lingvo universala al la internacia korporacio de instruituloj, kaj ke la aferojn por la tuta mondo komunaj oni ne faru ordoneme, sed lasu ilin al fina decido komuna.

Per tio ni komprenigos al ni, kial *Comenius* mem ne provis konstrui la artan lingvon universalan, kies signifon tiel alte li ŝatis kaj pro kiu laboro li, kiel pansofo kaj konanto de multaj lingvoj, nome de la lingvoj bohema, pola, germana, latina, greka, angla kaj eble ankaŭ de la lingvoj franca kaj hebrea, certe estis kompetenta. Li kontentiĝis certe per tio, ke — kiel li skribas en *«Via lucis»* (§ 21. de ĉpt. XIX.) — apogante sin sur la fundamentoj pansofiaj li kuraĝis esperi lingvon, kiu estus dekfoje pli facila ol la lingvo latina, ĉar ĝi estus sen malregulaĵoj, kaj centfoje pli perfekta, ĉar ĝi estus taŭga esprimi ĉiujn diferencojn de objektoj kaj ideoj, kaj milfoje pli taŭga por harmonia esprimado de karakteroj kaj substancoj de objektoj, ĉar tiel ĝiaj apartaj vortoj estus preskaŭ kiel difinoj...

Vidu, ĉu tio ne estas -- Esperanto?! (Daŭrigo.)



LABORO KONTRAŭ REVOLUCIO.

El la libro *«Otázka sociální»* (Sociala demando)
de prof. Dro *T. G. Masaryk*.

Ĝis nun la socio estas konstruata pli multe sur la morto ol sur la vivo. Ni ankoraŭ ne scias vivi. Vivi plene, pozitive. Ni tro ofte konservas nian propran vivon per la fremda morto. Ni detruas konstante kiel la vivon propran tiel la fremdan.

Ni ne scias edukadi niajn infanojn, ni ne scias konservi ilin sanaj, ni konstante malŝparas per la forto de vivo, forto propra kaj ankaŭ fremda. Mortigoj kaj memmortigoj estas nur akutaj aperoj de tempa detruado de la vivoj.

Ni ne scias labori. Ni ne estas laboremaj. Ĉiu igas labori la fremdajn manojn. Ni estas sklavigantoj kaj samtempe sklavoj. Pli multe — ni estas sovaĝuloj. Ni deziras ekscitiĝi, sed labori ni ne volas. Plaĉas al ni sporto, la sporto ekscitiga. Ankaŭ la revolucio.

Sed laboro, laboro efektiva estas laboro pomalgranda, ordinara, ĉiutaga. Tiel kiel la vera scienco okupas sin per la faktoj plej ordinara, tiel same la vera laboranto estas tiu, kiu scias fari laboron malgrandan, ĉiutagan, necesan. Kion signifas por matematikisto la kalkulo infinitezimala, kion por psikologio kaj fiziologio la malgrandaj, preskaŭ nepercepteblaj eroj da faktoj, kion por natursciencoj la atomoj kaj mikroboj, la samon por etiko signifas la laboro pomalgranda.

La pomalgranda laboro estas efektive laboro praktika, konkreta, vera — tiuj grandaj faroj heroaj estas kutimaj en fantazio kaj in abstracto. La utopismon oni venkas per laboro pomalgranda. Per laboro oni venkas ankaŭ la revolucionismon.

En la observado de tio, kio interesas nenium, en la farado de tio, kio por ĉiuj estas enua — per ĉi tio distingigas la herooj de estanteco. Sed ĝis nun ili estas malmultaj. Homoj preferas oferi sian vivon ol labori.

Homo efektive moderna kaj progresema estas karakterizata per laboremo. Homo efektive moderna — estas laboranto. Laboristo.

La grandaj epokoj ne estas momentaj; ankaŭ la historio, kiel la naturo, ne faras saltojn — ŝajne subitaj renversoj estas preparitaj de longe, sed homoj ne atentis tion. La Hegela neado de neo ne ekzistas en la historio.

Homoj proklamas kiel granda kaj heroa, kio estas ega, teatra, materia, kio forte frapas okulojn kaj ŝiras nervojn. Eksciteco, nemetodeco, periode aperantaj ideoj de tiel nomata genialeco, malordo de la vivo artista, nerva agitado: vireca trankvilo, metodeco, pensado serioza kaj forta, vivo pura kaj sendifekta, faroj kaj efektiva laboro. Ne fantaziemo, sed poezio. Ne forteguleco, sed forto.

Homoj havas pasion esti martiroj. Hodiaŭ ili mortbatas kaj mortturmentas sian plej bonan homon kaj morgaŭ la samaj personoj konstruos por li altarojn. Sed ili restos la samaj

sovaĝuloj. Ja hodiaŭ multaj faris por si el la doloro — la rimedon de agrablega sento.

Tial mi diras: for kun la martiremo! La amo estas vivo, ne morto. Vi ne havas rajton postuli sinoferadon kaj vi mem ankaŭ ne oferu vian vivon por ĉiuspeca bagatelaĵo! La martireco estas lukso kaj mistika de la ĝisnuna etiko sentimentala, romantika. Sed la sentimentaleco kaj romantiko estas egoismo. Pura egoismo — nur bone analizu.

El la bohema lingvo tradukis *Th. Ĉejka*.



LA BELULINO KAJ LA BESTO.

Malnova franca fabelo de s-ino *Leprince de Beaumont*.

(Daurigo.)

La Belulino pasigis en tiu palaco tri monatojn kun sufiĉe da trankvileco. Ĉiuvespere la Besto ŝin vizitis, parolis al ŝi dum la manĝo, kun kelke da simpla saĝo, sed neniam kun tio, kion oni nomas spriteco en la mondo. Ĉiutage la Belulino malkovris novajn bonaĵojn en tiu monstro. Per konstanta vidado ŝi kutimiĝadis al ĝia malbeleco kaj anstataŭ timi la momenton de ĝia vizito, ŝi ofte rigardadis sian poŝhorloĝon, por vidi, ĉu estos baldaŭ la naŭa; ĉar ĉiam la Besto senmanke venis tiun horon. Sole unu afero ĉagrenis la Belulinon, nome, ke la monstro antaŭ ol kuŝiĝi, ĉiam ŝin demandis, ĉu ŝi volas esti ĝia edzino kaj ŝajnis trapenetrata per doloro kiam ŝi nee respondis. Unu tagon, ŝi diris al ĝi: »Vi min malĝojigas, Besto; mi dezirus povu edziniĝi kun vi, sed, pro mia sincereco, mi ne dezvas kredi al vi, ke tio iam okazos. Ĉiam mi estos via amikino; penu per tio kontentiĝi.«

— »Devide, — rediris la Besto — mi estas justa kontraŭ mi mem. Mi scias, ke mi estas malbelega, sed treege mi vin amas. Tamen mi estas tro feliĉa, ke vi bonvolas restadi ĉi tie; promesu, ke vi min neniam forlasos.«

Ĉe tiuj ĉi vortoj, la Belulino ruĝiĝis. Ŝi estis vidinta en sia spegulego, ke ŝian patron ĵus malsanigis la ĉagreno pri ŝia perdo kaj ŝi deziris lin revidi. »Mi povus ja promesi al vi, — diris ŝi al la Besto — ke mi vin neniam forlasos, sed mi havas tian deziron revidi mian patron, ke mi mortos pro doloro, se vi rifuzos al mi tiun plezuron.«

— »Mi preferas morti mem, diris tiu monstro, ol vin ĉagreni. Mi vin sendos al via patro. Vi tie restados, kaj via Besto pereos pro korpremeo.«

— »Nel — diris la Belulino plorante — mi vin tro amas por esti kaŭzo de via morto. Mi promesas, ke mi revenos post ok tagoj. Vi vidigis al mi, ke miaj fratinoj edziniĝis, ke miaj fratoj foriris al la armeo; mia patro estas tute sola: permesu, ke mi restu ĉe li unu semajnon.«

— »Vi estos tie morgaŭ matene, — diris la Besto — sed memoru pri via promeso. Vi sole bezonos meti, en la momento de l'kuŝiĝo, vian ringon sur tablon, kiam vi volas reveni. Adiaŭ, Belulino!«

La Besto sopiris, laŭ sia kutimo, parolante tiujn vortojn kaj la Belulino kuŝiĝis tute malgaja, ke ŝi ĝin ĉagrenis. Kiam matene ŝi vekigis, ŝi sin trovis en la domo de sia patro, kaj tintiginte sonorileton, kiu estis apud ŝia lito, ŝi venigis la servistinon, kiu ĵetis grandan krion, ŝin ekvidante. Ĉe tiu krío, la Bonulo alkuris kaj preskaŭ mortis pro ĝojo retrovante sian karan filinon; ili sin tenis en ĉirkaŭprenado pli ol kvaronhoron. La Belulino, post la unuaj pasiaĵoj, pripensis, ke ŝi ne havas vestaĵojn, por leviĝi. Sed la servistino diris al ŝi, ke ŝi ĵus trovis en la najbara ĉambro grandan keston plenan je roboj el oro ornamitaj per diamantoj. La Belulino dankis al la bona Besto pro ĉiuj ĝiaj bonfaraĵoj. Ŝi prenis la malplej luksan el tiuj roboj kaj diris al la servistino, ke ŝi enŝrankigu la aliajn, kiujn ŝi intencas donaci al siaj fratinoj. Sed tuj kiam ŝi parolis tiujn vortojn, la kesto malaperis. Sia patro rimarkigis, ke la Besto deziras, ke ŝi ĉion konservu por si mem, kaj tuj la roboj kaj la kesto revenis en la saman lokon. La Belulino sin vestis kaj dume oni sciigis ŝiajn fratinojn, kiuj alkuris kun siaj edzoj. Ambaŭ estis tre malfeliĉaj. La plej maljuna edziniĝis kun nobelo tiel bela kiel Amoro; sed li estis tiel amema al sia propra vizaĝo, ke sole pri ĝi li zorgis de l'mateno ĝis la vespero, kaj malŝatis la belecon de sia edzino. La dua havis kiel edzon viron de granda spriteco; sed li ĝin uzadis sole por inciti ĉiujn homojn kaj unue sian edzinon. La fratinoj de la Belulino preskaŭ mortis pro kolero vidante ŝin vestitan kiel prinĉinon kaj belan kiel la taglumon. Kiom ajn ŝi ilin karesis, nenio sukcesis kvietigi ilian ĵaluzecon, kiu ankoraŭ pliiĝis, kiam ŝi rakontis al ili, kiel feliĉa ŝi estas. Ambaŭ ĵaluzulinoj malsupreniris en la ĝardenon por plori laŭvole, kaj ili diris inter si:



(Daŭrigo.)

LA REZULTATO DE MIA PACIGA ENTREPRENO.

Raportas kaj al ĉiuj bohemiaj esperantistoj prezentas

Dr. A. Batěk.

(Fino.)

Sed plej interese estas, ke la elektita prezidanto de la Unio mem, kiu estis elektita en la sama kunveno, kie oni voĉdone aprobis la malafablan refuton kontraŭ mi, tiel juĝas pri mia letero:*)

»Tre estimata sinjoro doktoro! Bonvolu akcepti mian plej sindonan dankon pro Via afabla alsendo de Via »malfermita letero al ĉiuj boh. Esperant.« Ĝia efiko sur min estas kvazaŭ printempa matena sunbrilo el malluma nuborjĉa ĉielo, kvazaŭ savanta gvidlumo en la ŝajne jam neforigebla ĥaoso, kaŭzita de tiom da malĝojigaj okazintaĵoj inter la bohema Esperantistaro. Por mi Esperanto estis jam perdinta la limbon de idealeco, sed Via sincera sindonema propono tiel energie esprimita sole por repacigi, reunuigi niajn modestajn vicojn, redonis al mi la esperon, ke ĉio ankoraŭ ne estas perdita. Mi deziras al Vi, ke Vi sukcesu forigi ĉiujn bedaŭrin-dajojn. Via nepre justa juĝo de l'aferoj rajtigas min, ke mi esperu . . . Ĉie la fundamento krakas, ĉi tie Esperanto kontraŭ ldo, tie Unio kontraŭ Asocio, persono kontraŭ persono! Tiel mi ne prezentis al mi Esperanton, kiam mi la unuan fojon eksciis pri ĝi. Sed Vi, tre estimata sinjoro doktoro, Vi estas mia nova espero. De malproksime mi de nun kun plej granda intereso sekvas la disvolvigon de nia afero, konstante alvokante benon por Via sukceso. Ĝi venu baldaŭ, kaj per ĝi la paco! Respektplene Via sindonema ing. Sitko.«

Tiu ĉi letero, kiun citi la aŭtoro permesis al mi, kaj la aliaj skrib-itaj de la membroj de la Unio kaj de la klubo, ĥnspiras al mi novan ku-raĝon, kuraĝon esperi, ke ĝis nun ĉio ne estas perdita. Tial mi prezentas al la bohemiaj esperantistoj la simplan proponon. Ni lasu la homojn, kiuj ne volas paciĝi, ni iru trans ili al tagordo tiel, kiel ili mem ĉiam kaj ĉie itis al tagordo trans la homoj nesimpatiaj al ili. Vere ni perdos per tio la gazeton, sed ni kunigos lahorantajn esperantistojn en unu unuigon. Mi estas konvinkita, ke, post la publikigo de tiu ĉi raporto, ĉiuj homoj, al kiuj la persona libereco kaj la prosperado de nia komuna lingvo estas karaj, iros kun ni. Kaj la ceteraj ne meritas la ŝaton, eĉ se ili posedus esperanton kiel eble plej bone. Ĉar la ĉefa afero ne estas teknika lerteco, kiun oni povas baldaŭ atingi per negranda diligenteco, sed la spirito kaj ideo, kaj tial la homoj, kiuj piedfrapas la personan liberecon, kiuj malpermesas viziti la paroladon malplaĉantan al ili, kiuj permesas al neniu paroli kaj skribi kontraŭ si, kiuj ĉiun opozicion por la vivo societa tiel sanan simple subpremas kaj el la societo eligas, la homoj, kiuj ne sentas, ke ili vivas en la jarcento dudeka kaj kondutas kvazaŭ mezepokaj inkviziciantoj, la homoj, kiuj per vanta suspektado kaj kalumniado malhonorigas la laboron de aliaj, la homoj, kiuj ne hontas publike atentigi pri tio, ke la titolo de konsulo, kiun ili mem akceptis, povus al iu kaŭzi malagrablaĵon

*) La originalo de la letero estas esperanta kaj ĉi tie ĝia teksto estas tute senŝanĝe represita.

ĉe la polico^{*)}), la homoj, kiuj publike en la gazetoj pro-
prigas al si la laboron de aliaj, tiaj homoj ne apartenas
inter ni. Tion malpli ni povas permesi, ke tiaj homoj, kiuj la spiriton
de la sklaveco kaj regemo enkondukas en niajn purajn vicojn, povu nin
Bohemojn reprezenti antaŭ la tuta mondo kaj en la internaciaj kongresoj.
Bohemaj esperantistoj, se Vi tion permesos, tiam Vi prave portos la sek-
sojn de la malestimigo de nia nomo antaŭ la fremdularo. — — —

Mi ripetas: ni perdos la gazeton, sed ankaŭ pri tio zorgis la mem-
broj, al kiuj burakratismo de la klubo en Praha ne malhelpis vigle labori,
kiuj eldonados ankaŭ la gazeton, kaj la gazeton pli bonan ol antaŭa. Ni
do iru simple trans s-ro redaktoro kaj liaj helpantoj al la tagordo. Se ili
rekonsciĝos kaj se ili volos labori kune kun ni, oni pardonu ilin, sed
ili ne devas plu regi nin. Se ni sukcesos unuigi ĉiujn bohemiajn esperant-
istojn, ni devas akcepti la principon, ke neniam iu povas esti persekutata
pro sia konvinko. Eĉ tiujn, kiuj kaŭzis la nunan malordplenan stanon, ni
ne devas malbone rememoradi. Se ili ne scias kompreni, kiel grandan si-
gnifon havas por la societa vivo la absoluta persona libereco, ni
komprenoble ne povas reprezenti nin en publikaj lokoj, sed malgraŭ
tio ili devas ĝui la samajn rajtojn kiel la aliaj. Sole en absoluta libereco
de la individuo kaj en la kiel eble plej granda decentrigo povas esti la
sukceso de nia entrepreno. Al la libereco senĉese pligrandiganta celas
la homa spirito. Esperanto devas esti ligilo kuniganta la naciojn kaj ĝi
devas nin liberigi de ĉiuj antaŭjuĝoj personaj kaj klasaj. Ni kreu la Aso-
cion, kies unua devizo estas egaleco, konkordio kaj frateco. Se ni
volas lumi al aliaj homoj, ni mem devas esti sen la makuloj.

Ĉiu el ni do zorgu pri sia pliboniĝo. Ni ne estus kapablaj paŝi
kiel ekzemplo en la frunto de aliaj, se ni ne scius konservi ordon en niaj
propraj vicoj. Ni farus malbonan servon al esperanto, se ni volus ĝin re-
prezenti tiamaniere ĉe ni en Bohemujo. Tjal kuraĝon! Ni ne timu konfesi
niajn estintajn erarojn kaj peni ne fari ilin estonte. Kaj kio estas ĉefa:
Ni ne uzu esperanton por niaj celoj partiaj! Pro malbona uzo eĉ
la plej bona afero povas malsukcesi. Kaj poste oni plendas pro la aferoj,
forĝante, ke malbona povas esti sole homo. Ni mem estu liberaj kaj ni
ne sklavigu aliajn! Ni ne konjektu, ke ni estas neeraremaj! Ni estu indulaj
pri l'erroj de aliaj kaj severaj pri l'erroj propraj.

Mi scias, ke mia raporto ne estas kaj ne povas esti plena; ĝin plen-
igi povas la diskuto, pri kiu mi petas. Mi volonte korektos ĉion, kio
montriĝas malĝusta.**)



RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Libera ligo por defendo de tuthomaraĵ interesoj estas
ligo de progresemaĵ homoj, kiuj volas 1. labori por tio, ke la homaro or-

*) Tiu nekredibla fakto okazis en la komerca ĉambro, kie la rajtig-
itoj de la Unio timigis la komitaton ekspozician per la diro, ke la
titolo «esperanta konsulo ekspozicia» uzita sur la ekspoziciaĵ flugfolioj
povas naski konflikton kun la polico!

La redakcio.

**) Tiujn «korektojn» oni sendu al la aŭtoro (en Plzeň), kiu publike
korektos ĉion, pri kio li ricevos kredindajn *argumentojn* (tial restos neatenti-
tataj frazoj kiel «Vi ne estas prava», «Vi estas malbone informita», «Vi ne
devas skribi pri tio, kion Vi ne komprenas» k. s.)

La redakcio.

panskými samideány navázati styky, uvádíme adresu S-o S. Yamasati, prez. de la Chugwai Shonen Esperanto Club, Kioto, Japanujo. A k rodičům voláme: podporujte korespondenci dětí s cizinou! *Hh̄b.*

Esperanto na obchodních školách švýcarských. Vyučování esperanta na obchodních školách zavedeno je v kantonech ženevském, vaudském a fryburském. Státní radě předloženo podání, jímž podepsaní občané žádají, aby vyučování esperanta zavedeno bylo na všech vyšších a obchodních školách švýcarských. *Hh̄b.*

Esperanto na českých školách. — S povolením zemské školní rady moravské zahájen byl 2. května 1909 kurs esperanta na české zemské vyšší reálce v Kroměříži. Z přihlášených 70 žáků připuštěno 45. Ostatní sůčastní se kursu podzimního. Vyučuje p. učitel Jos. Krumpholz z Bystřice p. Hostýnem. — Dne 5. května 1909 zahájen byl kurs esp. na gymnasiu a reálce v Moravské Ostravě. Vyučuje p. učitel Krumpholz. — Kurs na gymnasiu v Přerově odložen byl na podzim. *Kronikář.*

České výtahy z esperantských časopisů přináší *»Přehled revuů«*, světová encyklopaedie současné kultury, redigovaná a vydávaná Př. Ot. Plačkem (Král. Vinohrady, Kollárova 19). »P. R.« přináší stručně přehledně dle materiálu uspořádané obsahy všech revuů českých a významných revuů cizích, takže v něm zrcadlí se všechny myšlenkové projevy současné doby. Z esp. časop. až dosud zastoupeny byly kromě revue »Český esperantista« časopisy »Internacia pedagogia revuo«, »Internacia socia revuo«, »Espero pacifista« a »Čas. čes. esp.«, kterážto řada nyní značně se rozšíří. Esperantu věnována tu byla pozornost také zvláštním článkem (Jos. Krumpholz: Idea jaz. mez. a esp.). »P. R.« užívá také služeb esperanta k získávání výtahů z revuů exotických (na př. japonských, jichž výtahy zaslíá esperantsky prof. dr. Kroita z Tokia). Svým cenným obsahem i pozorností k esperantu zasluhuje »P. R.«, který vychází 14denně ve velkých 6archoových sešitech (za čtvrtletní předplatné 5 K), plně pozornosti a podpory českých esperantistů. *R. N.*

České přednášky o esperantu. — V Červ. Kostelci dne 22. dubna 1909 měla horlivá propagátorka a pilný člen »Svazu česk. esperantistů« učitelka sl. Julie Šupichova přednášku o esperantu v »Besidce« pro žákyně místní obchodní školy (na žádost předsedkyně dámského spolku »Dagmar«, který tyto besidky vede). Zájem byl veliký a mnoho posluchaček přihlásilo se do kursu, který sl. Šupichova povede. — V Písku 28. března přednášel o esp. p. Procházka v »Sokole«. — V Golčově Jeníkově přednášel v »Sokole« (4. dubn.) p. Faulner. — V Třebechovicích uspořádala (4. IV) přednášku »Č. O. B.«; promluvil p. Procházka. — V Dačicích (na Moravě) přednášel dne 15. dubna p. B. Kamenář, kand. prof., ve schůzi učitelského spolku pro soudní okres dačický. *Kronikář.*

Rozmanitost z esperantského hnutí. Ve Lvově vyučuje se esperantu na vyšší reálce, *»Vsesiátskij akademij«* a státní průmyslové škole. V Paříži založen byl kroužek esperantistů polských. — Vlivný pařížský obchodní svaz »Alliance commerciale française« přijal užívání esperanta ve stycích zahraničních. — Mexická vědecká společnost mezi literárními konkursy, které vypisuje při příležitosti stého výročí samostatnosti Mexika, stanovila také thema o podstatě, užitku a výchovné ceně esperanta. — Severoamerický svaz esp. má 72 krajské jednoty s 2,500 členy. — Dle »Officiala gazeto esp.« existovalo 5. III. 09: 1327 propagačních, 129 odborných spolků esp., 317 měst s esp. konsuláty a 83 esp. časopisy. *Kronikář.*

INFORMACE A DOKUMENTY.

Veřejné zkoušky z esperanta v období jarním konaly se před zemskou zkušební komisí pro Čechy o velikonočních (12. IV. 09. odpol.) v místnostech Esperanto-Oficejo delegáta p. Vojt. Krause, mag. adjunkta v Praze-1-320. Zkoušce o působivosti vyučování esp. podrobili se s úplným prospěchem pp. *Rudolf Hromada*, studující reálky v Praze, *Josef Jehavý*, posluchač filosofie v Praze, *Vojt. Novotný*, profesor v Pisku, *Václav Riegel*, posl. práv v Praze a sl. *Jul. Šupichova*, učitelka v Červeném Kostelci. — Zkoušky v období letním konati se budou o svátcích svatodušních před zemskými zkušebními komisemi v Praze a v Brně. Přihlášky přijímají a informace udělují (na požádání dvojitým koresp. listkem) předsedové zkušebních komisí Dr. Stan. Kamaryt, Praha-VI. (pro Čechy), Th. Čejka, Bystrice-Hostýn (pro Moravu). O. Š.

Česká společnost esperantistů v Praze (Bohema societo esperantista en Praha) konala letošní valnou hromadu dne 9. března ve spolkové místnosti v Kolářově restaurantu. Děk píli a obětavosti četného členstva dosáhla společnost za první rok své činnosti výsledků velmi uspokojivých, byť její úspěchy byly odpůrci popírány, umlčovány, ba i si osvojujány. Společnost pohnula výstavní výbor Obch. a živn. komory k tomu, že byly vydány a do celého světa rozeslány esp. letáky o jub. výstavě (10.000 exempl.) a sama vyřizovala rozsáhlou esp. korespondenci Obch. a živn. komory. Spolu s dámským klubem esp. společnost uspořádala prvou veřejnou esp. výstavku v Praze v grafickém pavilloně na jub. výstavě, pozvala na výstavu cizí esperantisty, zejména účastníky drážďanského kongresu, a postarala se četným cizím návštěvníkům Prahy (početm asi 500) o ubytování, provázení a pod. Návštěvy ty upoutaly k sobě značnou pozornost širšího obecnstva a vyvolaly potěšitelný zájem o esp., který projevil se pak v neočekávané návštěvě kursů esp., pořádaných společností v pražských školách. Společnost poprvé vymohla propůjčení universitních poslucháren ku pořádání esp. kursů. Na podzim společnost uspořádala v různých částech Prahy 4 veřejné kursy esp., jichž účastnilo se na 600 posluchačů. V zimě uspořádán byl 20 hodinový kurs počáteční i pokračovací v místnostech Karolína. Za účelem propagačním vydány byly s esp. textem umělecké pohlednice (16 druhů) čes. umělců Šetelíka a Šafaříka a vkusné esp. odznaky. Při volbě nového výboru zvoleni byli: JUDr. Fr. Palek, c. k. finanč. sekretář (předs.), K. Biskup, účetní rada král. hl. města Prahy (místopředs.), JUC. Jos. Barviř, kand. advokacie (1. jedn.), Mat. Krausová (2. jedn.), Jar. Sýkora, vrchní úřed. Zem. banky (pokl.), A. Cerhova (knih.), Jos. Houdek, profesor a Fr. Bartoš, soukr. úředník. Náhradníky jsou: Ph. Dr. Kamaryt, Ing. C. A. Berger, sl. Klírova, pí Bartošová. Revisori účtů: J. Chalupický, účetní rada. Jos. Herzog, pokladník král. hl. města Prahy. *Barviř.*

První dámský český spolek esperantský konal dne 1. dubna t. r. v místnosti Ženského klubu českého za velké účasti pátou (od ustavení jakožto samostatného spouku druhou) valnou schůzi. Z jednatelké zprávy o činnosti spolkové uvádíme krátce toto: Spolek účastnil se činně všech prací spojených s návštěvou cizích esperantistů v Praze za jubilejní výstavy, účastnil se také pořádání nákladné výstavy v grafickém pavillonu, uspořádal během roku čtyři veřejné kursy vyučovací, které byly hojně navštěvovány a přátelský večírek (11. 11. 09) pro své členy a zvané hosty s esp. programem, k němuž originály (monolog, aktovku, básně) obstaraly členky. Do výboru zvoleny byly: za předsedkyni sl. Bož. Studničkova, místopř. sl. Lud. Tesařova, jedn. pí Mat. Krausová, pokladní sl. Sobotova, knihovni

sl. Zápotocká. Snaha výboru propagovati esperanto jest s pochopením podporována veškerým členstvem, jehož počet zvláště v poslední době velmi utěšeně vzrůstá.

Mat. Krusová.



LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Literatura almanako de *Lingvo internacia* 1909. Paris, Presa esperantista societo (rue Lacépède 33). Prezo? (Pĝ. 92). — La libreto enhavas 14 artikolojn verkitaĵn aŭ tradukitaĵn de la plej konataj esperantistoj. Ĉiuj 12 akademianoj kaj 5-oj Corret kun Era partoprenis en tiu ĉi eldonaĵo. Ĉiu artikolo estas akompanata per portreto de l'aŭtoro kaj biografiaj notizoj kaj en la fino de l'libreto estas aldonitaj karikaturoj de l'akademianoj kun ŝerca artikolo de Era (La Akademio). La artikoloj estas plejparte bonstilaj kaj facile legeblaj. *Bšk.*

Legolibreto. Tradukis *J. Borel*. Berlin, Verlag Möller & Borel. »Esperanta biblioteko internacia« No. 1, Prezo Sm 0'10. (Pĝ. 44). — La broŝuro estas kolekto da mallongaj kaj facilaj fabloj, anekdotoj, rakontoj, priskriboj, historiaj artikoloj elektitaj el la germana literaturo. Zorga elekto, bona traduko, bela ekstera aranĝo kaj malgranda prezo estas ŝatindaj ecoj de tiu ĉi libreto, kiu certe trovos grandan disvastigon en kursoj pri esperanto. *Bšk.*

Fabeloj de Andersen. Tradukis *F. Skeel-Giörling*. Berlin, Möller & Borel. »Esperanta biblioteko internacia« No. 2. Prezo Sm 0'10. (Pĝ. 42.) — En tiu ĉi broŝuro estas kolektitaj tradukoj de 5 fabeloj de l'eminenta dana verkisto, kies biografion la aŭtoro antaŭmetas. La broŝuro estas 23 n-o de »Esperanta biblioteko internacia«, kies celo estas »kolekti specimenojn de bona literaturo de ĉiuj nacioj kaj prezenti ilian esp. tradukon en formo de malgrandaj eldonaĵoj tre malkaraj« (po 10 sd = 24 h.) La eldonantoj bonan ideon bonege realigas. *Hkb.*

Esperanto. Úpiná mluvnice a slovník na jednom listě. Eldonis *Th. Čejka*. Bystřice-Hostýn, Moravio. Prezo (afrankite): 10 ekz. 20 h, 50 ekz. 60 h, 100 ekz. K 1'10, 500 ekz. 4 K, 1000 ekz. 7 K. — Tiu ĉi bohema propaganda flugfolio, kies dua eldono ĵus eliris, estas vera bohema esperanto-ŝlosilo sur unu folio enhavante informojn pri esperanto kaj esperantista organizo, plenan gramatikon kaj radikvortaron (2000 vortoj). Ĝi estas bela kaj efika propagandilo, kies malgranda prezo (2 h), multe malpli granda ol tiu de similaj eldonaĵoj alilingvaj, ebligas al niaj propagandantoj disvastigadi ĝin kiel eble plej multe. *Rd.*

Lingvo internacia (XIV, 4) enhavas interesan artikolon »La forkuro el Eŭropo« priskribantan la elmigradon de Eŭropanoj en Amerikon. En ĝi oni legas: »Statikisto Kapp elkalkulis, ke la perdo kaŭzita al Eŭropo per elmigrado dum unu jarcento prezentas cent miliardojn. Laŭ lia opinio tio estas mona sumo, ne sole homaj laborfortoj. Kaj aliaj seriozaj scienculoj elkalkulis, ke la elmigrantoj ĉiutage elportas el Eŭropo kvar milionojn«. La aŭtoro demandas: »Kio fariĝos el Eŭropo, se ĝi daŭrigos konstante sin malfortigi por Ameriko?« Pripensinda problemo. *Bšk.*

The British Esperantist (V, 52) publikigas leteron de Dro Zamenhof, en kiu oni legas: Mi kredas profunde, ke baldaŭ venos la tempo, kiam la diversaj pecoj da tero ĉesos esti apartenaĵo de tiu aŭ alia speciala nacio, regilio aŭ politika partio, ke ili fariĝos apartenaĵo de ĉiuj siaj naturaj loĝantoj, ke neniu plu havos la rajton akiri aŭ fordoni iun teritorion

aŭ perforte altrudi al ĝiaj loĝantoj leĝojn aŭ morojn, kiujn ili ne deziras. Mi kredas, ke baldaŭ venos la tempo, kiam la loĝantaro de ĉiu teritorio konsistos sole el homoj kaj civitanoj, sed ne el popoloj mastrantaj kaj mastrataj. *Rd.*

Germana esperantisto (VI, 5). En la artikolo »Esperantaj ekzamenoj« J. Wenger skizas, kiel laŭ lia opinio devus funkciadi ekzamena maŝino. En ĉiu lando, la esperantistoj unue starigu specialan — »Ekzamenan komitaton.« Plej taŭge estus, se tiu komitato konsistus grandparte el profesoroj aŭ instruistoj, kiuj, pro sia metio, jam spertis la rimedojn sukcese esplori la scion de lernantoj aŭ kandidatoj. Poste oni okazigu de tempo al tempo ekzamenkunsidon, jen en tiu jen en alia urbo. . . Oni ankaŭ povos, en grandaj landoj, starigi pli ol sole unu ekzamenan komitaton.« Estas interese, ke tiuj ĉi ideoj tute respondas al la plano, laŭ kiu aranĝis siajn ekzamenojn »Bohema asocio esperantista.« *Bšk.*

Informaj raportoj (II, 4, 5) en la artikolo »La Ligo kaj B. U. E.« proklamas: »la Ligo tute ne havas la ambicion, ludi la unuan, la gvidantan rolon en la tuta Aŭstrio esperantista; nature ĝi ankaŭ ne permesos, ke alia Ligo aŭ Unio faru ĝin.« Al tiu ĉi ĝusta rimarko la aŭtoro aldonas: »tia-kaŭze (la Ligo) ekz. kontraŭbatalos la imagon, kvazaŭ B. U. E. riprezentus ĉiujn esperantistojn en Bohemio (Bohemio? Ne ekzistas Bohemio?); ĝi riprezentus nur la ĉekajn.« Ni aldonas: B. U. E. ne riprezentus eĉ ĉiujn bohemiajn esperantistojn, ĝi havas rajton riprezenti sole la grupojn al ĝi aliĝintajn kaj neniun alian; tio estas klara por homoj honestaj kaj lojalaj. — La gazeto enkondukis du novaĵojn: unue koloran kovrilon kun germana teksto propaganda, due rubrikon por ŝakludo. En la nomaro de l' interŝanĝataj gazetoj mankas nia revuo; kial? *Rd.*

Export Esperantist. A Monthly Journal Devoted to the Export and Import Trade of the United States. Red. & adm.: Chicago (U. S. A.), Bldg Security 404. Abonprezo 2 Sm. — Ilustrata, esperanto-angla gazeto komerca kaj komercanta. Ĝi enhavas krom generalaj artikoloj komercaj priskribojn kaj ilustraĵojn de diversaj eltrovaĵoj, kies vendadon la gazeto perigas. — Generalaj artikoloj el la 3 a n-o (1): Nacia tarifa konferenco, La oceana komerco de Bostono, Brita komerco kaj financo en 1908 ktp. *Rd.*

Hungara esperantisto. Oficiala monata organo de Hungara esperantista societo. Red. & adm.: Budapeŝt VI, Alpar- u. 8. Hungario. Abonpago Sm 1.70. — Magiareperanta fundamentista gazeto. — La 1 a n-o (1) estas plejparte dediĉata por gramatikaj informoj kaj propagandaj klarigoj. *Rd.*

La Pioniro. Ofic. organo de la Soc. hung. esp. »Student-grupo«. Red. & adm.: Budapeŝt VI, Nagymező-u 12. 1/16. Abono 1 Sm. — Aŭtografita gazeto, el kies 3 a n-o (1) ni citas: Vivo en la mondiverso, Nova elemento (Hungaricum). *Rd.*

Ricevitaj eldonaĵoj (nepriparolitaj supre). — *Esperanto* (V, 52). U. E. A. kaj komerco. Tra Kalabrio. — *Pola esperantisto* (IV, 4). Riproĉoj farataj al lingvoj internaciaj. Le profitoj de esperanto. — *Oficiala gazeto esperantista* (I, 10). — *Voĉo de kuracistoj* (II, 5). — *Dia regno* (II, 4). — *Swisa espero* (VII, 4). — *Belga esperantisto* (1, 6). — *La Holanda pioniro* (1, 7). — *Normanda stelo* (II, 5). — *Ĉu internacia monunuoj kaj pagilo estas efektivegebla* (E. Ĉefeĉ). — *Ĉekbanko esperantista*. — *La departemento Ain*. Gvidlibro. — *Por la demokratio*. Kio estas »Sulko«? *Rd.*

Zodpovědný redaktor: Dr. Stan Kamaryt. — Nakladatel Ferd. Boháček, knihkupec. — Tisk »Politiky« v Praze.